

## Terminologia anguleto

### Ilĥn- kaj ilĥt-

El la greka *ilĥnos* (latine transskribita *ichnos*) = pied(spur)o kaj *ilĥtis* (latine transskribita *ichthys*) = fiŝo, iom post iom deriviĝis konsiderinda nombro da diverssciencaj vortoj. Ni menciuj porekzemple almenaŭ dekon da ili:

1. ilĥneŭmono (laŭ PIV "ikneŭmono"!)
2. ilĥnito
3. ilĥnofosilio
4. ilĥnogramo
5. ilĥnologio
6. ilĥtamolo
7. ilĥtiofagio
8. ilĥtiofaŭno
9. ilĥtiokolo (fundamenta!)
10. ilĥtiozo (laŭ la nova PIV "iktiozo"!)

Sciencistoj nepre devus kondamni la leksikan ĥaoson, kiu regas en la nova PIV (2002). Oni ja ne rajtas, redaktante tiun aŭ alian fakon, tute arbitre aŭ lasi la grekdevenan Ĥ aŭ fonetike misformi ĝin per K.

Tian fuŝan procedon ne permesas al si etnolingvoj. Tiom malpli por la zamenhofa planlingvo decu la enigma nesistemeco, precipe se temas pri sferoj pure sciencaj.

Dr. J. KAVKA  
Lužná 7 – Vokovice  
CZ – 160 00 - Praha / ĈEĤIO

### Dekronigo de kelkaj centoj da kapvortoj

Ni unue studu la aferon **statike kaj vortare**, nome per la studo de la kapvortoj en PIV-1 (1970) kaj PIV-2 (2002). Entute en PIV-1 estas 268 kapvortoj kun diftongo aŭ. Ni forigu el ili la kronon: ankau, audi, auguri, augusto... Estas 114 kapvortoj kun diftongo eŭ. Ni forigu la 114 kronojn: Europo, euforbo, terapeuto... Ni forigu ankaŭ 9 kronojn de kapvortoj kun oŭ. Do 391 kapvortoj de PIV entenis la literon ŭ (*Albault*, 1988, p.49). Ni ŝparu tiujn 391 kronojn. Ili utilas nur por ornamo!

La lingvo aperas malpli peza, pli leĝera, dum ĝi perdis nenion, nenion pli ol ĝi perdis antaŭ jarcento, kiam oni forigis la "streketojn", kiuj ĝis tiam dividis la kunmetitajn vortojn (**Fundamento**, p. 84: frat'in'o; hodiaŭ skribata pro klareco: frat/in/o).

### Ni nun vidu la aferon **dinamike kaj entekste**

Por tio ni uzu 12-paĝan ĵusverkitan medicinan tekston, elfrancigita de la aŭtoro, kun la titolo "Sofrologio kaj la kuracanta parolo". La manuskripto konsistas el entute 26771 karakteroj, 59 linioj kun ĉ. 73 literoj, signoj aŭ spacoj surpaĝe. La artikolo estas intertempe publikigita en *Scienca Revuo* (*Albault*, 2003). En ĝi plene mankas hiatoj a'u, e'u, o'u. Aliparte mi forigis el ĝi ĉiujn kronojn. Fine, per duobla ŝanĝo el la tipo (**au** → **aux**, kaj reen → **au**) ni ricevis la nombrojn de la diversaj diftongoj. Ili estas: **au** = **118** (el kiuj 1 Au); **eu** = **10** (el kiuj 1 Eu); **ou** = **0**, do, entute 128 kapvortoj entenantaj po unu diftongon (aŭ, eŭ). La dispartigo inter ambau diftongoj estas tute alia ol en la statika parto; vortare: 268/114; tekste: 118/10. Ni citu inter tiuj vortoj: au (38), almenaŭ (3), ambau (4), ankau (25), ankoraŭ (7), antaŭ (9), autonoma (2), aŭtoro (2), hodiaŭ (2), kontraŭ (3), laŭ (11).

### Problemo de la **hiatoj a'u, e'u, o'u**

Ili ne multas en nia lingvo, sed eĉ kleraj Esperantistoj erare prenas tiujn hiatojn au, eu, ou por diftongoj, por kiuj "oni forgesis kronojn". Oni konsideru, ke la diftongoj estas konsiderinde pli multaj kaj do aperas kiel la normo: ĉiu grupo de du vokaloj au, eu, ou estas diftongoj. Tamen estas esceptoj kaj ja ilin, sed nenion alian, oni aparte notu! Necesas konkrete ilin signi, ĉar ili malmultegas, dum necesas pozitive atentigi pri ili. Ni proponas signi ilin per disiga signo inter ambau hiataj vokaloj: ekzemple a'u, e'u, o'u (imito de diversaj lingvoj).

Cetero ili aperas nur en 14 radikoj de PIV-1, nome en Ema'uso, jesa'ulo, Kaperna'umo, Ra'ulo, Sa'udi-Arabio, Sa'ulo (entute 6 kun **a'u**); Ale'utoj, ge'umo, Kre'uzo, ole'umo, Re'unio, Se'ulo, tede'umo (entute 7 kun **e'u**); no'umeno: nur 1 kun **o'u** (*Albault*, 1988, p.64). Temas ja pri radikoj por **maloftaj nocioj** (5) aŭ por **propraj nomoj** (9): ili do ne konsiderinde povas modifi la aspekton de kiu ajn kuranta teksto.



En la nova PIV-2 ili ĉiuj reaperas, sed, ĉar mi ne faris la saman enketon kiel por la unua eldono, mi ne povas diri, ĉu estas novaj radikoj el tiu speco. Mi povas nur aserti, ke du radikoj estas modifitaj! Sa'udi-Arabio kaj Kre'uza de PIV-1 iĝas Sa'ud-Arabio kaj Kre'uzo en PIV-2. Pri la unua modifo: la propra nomo Sa'ud estas Araba kaj la apostrofo estas en la loko de Araba sono ekzistanta nek en Okcidentaj lingvoj nek en Esperanto ("voĉa laringa vibro"). La fina i (= -a) estas Araba marko por adjektivo (detaloj sur p. 64, *cit. loc.*). La dua modifo devenas de tio, ke la nova redaktoro, male al la unua (*Waringhien*), ne akceptas proprajn nomojn de virinoj kun finaĵo -a, kiujn li prave konsideras fremdaĵoj en Esperanto.

### Konklude

Ni do konkrete forigis 128 kronojn en medicina teksto de *Albault* (2003) kaj eĉ image 391 kronojn en kapvortoj de PIV-1. Sed ni tie ĉi image aldonis 14 signojn por 5 komunaj vortoj kaj 9 propraj nomoj. Mi nuligis la krono-nombron en la teksto (128 → 0), sed nur grave reduktis ĝin en la vortaro (391 → 14), do 391/14 – t.e. proksimume 30/1. Estas vere, ke ekzistas **aliaj hiatoj** post radikoj finiĝanta per a, e, o (bela-, obe-, veto-), se sekvas radiko, sufikso au finaĵo komenanta per u. Tiuj "okazaj" hiatoj estas tre malmultaj: troviĝas eĉ ne unu en nia eksperimenta 12-paĝa teksto **ne intence farita por tio**. Kompense ni povas rimarki, ke se ni tenas nin ĉe la solaj komunaj vortoj, tiuj estas nur 5. Kaj la proporcio estas 391/5, t.e. ĉirkaŭ 80/1. *Zamenhof* en la Fundamento (vd. "Rimarko" post la alfabeto) allasis, ke anstataŭ ŭ oni povas uzi ordinaran u.

La eseo, kiun mi nun prezentis, pravigas tiun Zamenhofan proponon, kiu datumas de epoko, kiam interkonsente la Esperantistoj forigis la "famajn streketojn" (frat'in'o, frat/in/o).

### Referencoj

ALBAULT André (1988): Studo de la vortoj entenantaj unu el la silaboj aŭ, eŭ, oŭ. Sur p.49-67 de Akademaj Studoj 1988-1990. *Esperanto-Press, Bailieboro, Kanado*. 560p. ("Komparo kun vortoj entenantaj hiaton" sur p.64 k.sekv.)

ALBAULT André (2003): Sofrologio kaj la kuracanta vorto. *Scienca Revuo*, Vol. 54 (2003), p.83-94

Dr. André ALBAULT  
21, rue de Verfeil  
FR – 31200 Toulouse  
FRANCIO

### Scienca eĥo

#### Placebo – inertaĵo kun forta efikeco

En la nova PIV (2002) troviĝas la vorto "placebo" kun la difino "inerta substanco, ekstere simila al tiu aŭ tiu medikamento, sed havanta nenian farmakologian efikon". Alivorte do temas pri ŝajna medikamento, sen iu ajn efikanto - sekve ankaŭ sen iu ajn efikeco kun nur ŝajna prospero. Analizuloj, elprenu viajn lerneajn sciojn! Latinlingva "placebo" estas la 1-a persono singulara futura de la verbo "placere" – mi plaĉos, mi estos laŭ via gusto, mi konsentos, plezurigos vin, estos ekŝatata, mi komplezos...

En la hodiaŭa signifo la vorto „placebo“ originas – respektive devenas – el la biblia 116-a psalmo, kiu en la mezepoko apartenis al la liturgio por mortintoj. Dum enteriĝo, tiu psalmo estis kantata de luprenitaj funebrant/in/oj, kiuj pro tio estis nomataj "placebokantantoj". En la jaro 1803 la vorto ekaperis por la unua fojo en medicina publikigaĵo. En tiama "New Medical Dictionary" la koncerna mencio laŭtas: "... tiel estas nomata medikamento, kiu estas farata pli por trankviligi la pacienton ol lin helpi." El medicina vidpunkto pli bone kaj pli ĝuste anstataŭ "pli – ol" oni eble diru: "kaj – kaj".

Ĉar krom supernivele troaltigitaj "saltitaj" prezoj ludas gusto kaj koloro decidan rolon por la grado de placeba efikeco. Gluti amarajn pilolojn plej bone efikas. Bluaj kaj verdaj efikas trankviligaj; flavaj, oranĝkoloraj kaj ruĝaj piloloj efikas pli ekscite, lavendokoloraj placeboj ofte estas halucinaj, kaj la brunaj rezultigas kiel lakaĵo.

La plej bona kaj videbla "efiko per senefikaĵo" certe estas infekto. Ne-kontestebla placeba "kuracad-stelulino" estas la kontraŭdoloro aplikata purpurkolora vitamino-B-12-injekto en la postajon. La usona dolor-esploristo *Jon D. Levine* konstatis, ke la efikosento egalas ĉe la paciento al tio de 5 miligramoj da morfino. Esenca elemento de placeba efikeco estas la ĉarlataneca efiko. Ĉar placeboj – simple aĉetitaj en farmacio – tute ne helpas...  
(ie iam legite) *sa*

Fiero aŭ orgojlo?

#### Porpatruja aresto unusemajna

Brita pensiulo, kiu dum oficiala nombrado de la loĝantaro ne volis informi pri sia nacieco, estis kondamnita al septaga mallibereja puno. Sepdeksepjaraĝa *Robert RELF* kritikis, ke sur la balotad-formularo oni ne diferencigis inter angla, skota kaj kimra deveno, kaj pro tio li ne indikis sian nacian apartenecon. La rezulto: oni monpunis lin je 150 sterlingaj pundoj (€ 245.00). La akuzato rifuzis obstine: "Sur la formularo oni po-